



katolika **,7** ***sento*** **4** |

anno 53°
u.e.c.i.



KATOLIKA SENTO

**BOLLETTINO DELLA
UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)**

Anno 53° - 1974

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (MI)

Redattore per la
Voce Esperantista di Roma:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA
Poŝtĝirkonto 1-37638

Redattore
del Bollettino U.E.C.I.:
SIG. GLAUCO CORRADO
Via Palmanova 28
20132 MILANO

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO
Poŝtĝirkonto 3-7791

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

**Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964**

KATOLIKA SENTO

n° 6

53a Jaro

Junio 1974

Ekzameno pri "PATRO NIA"

De Aŭtoro Anonima

- Vi ne povas diri: PATRO, se vi ne kondutas kiel Lia infano en la ĉiutaga vivo.
- Vi ne povas diri: NIA, se vi vivas sen spirita izoleco.
- Vi ne povas diri: KIU ESTAS EN LA ĈIELO, se vi pensas nur pri teraj aĵoj.
- Vi ne povas diri: SANKTIGATA ESTU NOMO VIA, se vi ne ĉiam honoras Lian Nomon.
- Vi ne povas diri: ALVENU REGNO VIA, se vi konfuzas la venontan regnon de Dio kun tera sukceso.
- Vi ne povas diri: FARIĜU VOLO VIA, se vi ne volas akcepti la planon de Dio rilate vin.
- Vi ne povas diri: PANON NIAN ĈIUTAGAN DONU AL NI HODIAŬ, se vi ne zorgigas, ke aliaj malsatas.
- Vi ne povas diri: PARDONU AL NI OFENDOJN NI AJN, se vi malamon portadas kontraŭ iu.
- Vi ne povas diri: NE KONDUKU NIN EN TENTON, se vi intence iras fari pekon.
- Vi ne povas diri: LIBERIGU NIN DE LA MALBONO se vi ne estas kontraŭ ĉia speco de la malbono.
- Vi ne povas diri: AMEN, se vi ne aŭskultis la vortojn de la PATRO NIA kun konvinkiĝo.

Trad. J. Hamvai, Auckland

PER INIZIATIVA DELLA U.E.C.I. (Unione Esperantisti Cattolici Italiani,) nei giorni 28-29-30 aprile u.s., si è svolto a Rimini un Convegno di studio per sacerdoti sul tema: "L'esperanto valido strumento di evangelizzazione".

Alla prima giornata di lavoro ha partecipato il Presidente dell'Unione Internazionale degli Esperantisti Cattolici, don Ferdinando LONGONI, della Diocesi di Milano, con una relazione sul tema del Convegno.

Per un pubblico qualificato, rappresentanti di varie Diocesi e di istituti religiosi, sono state successivamente presentate da esperti sacerdoti relazioni ed esperienze che hanno confermato il valore dell'Esperanto come mezzo di comunicazione anche per la Chiesa con particolare riferimento alle situazioni di ministero pastorale dove la diversità della lingua costituisce un ostacolo: emigrazione, scuola, turismo, liturgia.

Il prof. don Angelo Duranti, Direttore di "Biblia Revuo", rivista di studi biblici e orientalistici, ha parlato di una nuova traduzione della Bibbia in Esperanto già in corso ad opera dell'Associazione Internazionale dei Biblisti e Orientalisti di cui egli stesso è Presidente; ha rilevato la difficoltà per gli stessi studiosi di seguire le numerose pubblicazioni in molteplici lingue; ha sottolineato il consenso di molti biblisti e orientalisti per la proposta "esperanto" come lingua comune anche per pubblicazioni di prestigio per gli studiosi e per le masse popolari.

Padre ALBINO CICCANTI, Presidente dell'U.E.C.I., ha presentato la sua esperienza di sacerdote esperantista nella pastorale del turismo. Viaggiando dall'Europa all'Australia e all'America, p. Ciccanti ha

detto di aver usato di preferenza l'esperanto, la lingua del suo pubblico più frequente, e di aver avuto molti contatti con emigranti italiani all'estero e gruppi di turisti stranieri, specialmente a Rimini, dove egli risiede. La difficoltà della lingua incide troppo spesso negativamente nella fase di inserimento degli emigranti nella vita del nuovo Paese ed è un ostacolo nel ministero pastorale. Il problema non sarà mai risolto, nonostante i considerevoli investimenti delle varie Nazioni, finché non si deciderà per lo studio di una stessa seconda lingua sin dalle elementari.

Proprio per dimostrare in concreto che si può iniziare a risolvere il problema partendo dalla scuola elementare, è stata messa in programma una relazione su "Esperanto e scuola primaria" tenuta dal dott. Sergio MARIANI, direttore didattico della scuola elementare "Oltresavio" di Cesena. Il dott. Mariani, premesse le motivazioni e le circostanze favorevoli che hanno determinato l'introduzione dell'esperanto nella sua scuola, ha parlato del valore educativo dell'esperanto e dei molteplici interessi suscitati nei ragazzi dalla corrispondenza con svariati paesi.

In particolare, lo scambio di visita fra un gruppo di ragazzi esperantisti di Cesena con quelli di Zagabria ha dimostrato l'utilità e la facilità dell'esperanto, confermando in pieno la tesi degli esperantisti che si battono per l'introduzione dell'esperanto in tutte le scuole del mondo.

P.G. KORITKOWSKI, un sacerdote polacco dell'ordine dei frati minori cappuccini, ha parlato di "Esperanto ed Ecumenismo". Nella sua tesi per il dottorato in Teologia "Ekumenismo kaj internacilin

gva problemo", padre Koritkowski affronta il problema della lingua universale e l'elemento ecumenico in esso contenuto. Citando fatti e persone, iniziative del passato e di oggi, l'autore ci permette di prevedere con ottimismo la applicazione dell'Esperanto su larga scala nei vari movimenti ecumenici.

Sul tema "Esperanto e Liturgia" ha parlato il prof. don Bruno BENINI, assistente F.U.C.I... Una lingua comune per la Chiesa, pur restando valido l'uso delle lingue locali, è di estrema evidenza. Il relatore, pur senza essere un liturgista, ha interpretato l'atteggiamento favorevole della Chiesa per l'Esperanto come lingua liturgica, fino alla realizzazione del Messale festivo che sta per essere stampato in esperanto.

+ + +

Proposte dei Sacerdoti Esperantisti alle

Ven.de Curie Diocesane:

1. Segnalare a questo Centro nazionale U.E.C.I. il nominativo di un Sacerdote, membro del Consiglio Pastorale locale, possibilmente quello per il turismo, per opportuna collaborazione.
2. Far conoscere la presente relazione ai propri Sacerdoti tramite il Bollettino o rivista diocesana con preghiera di inviare una copia della avvenuta pubblicazione a questa sede nazionale.
3. Per Sacerdoti e simpatizzanti è previsto per settembre 1975 a Roma un incontro in forma di esercizi spirituali. Gli interessati diano sin da ora la propria adesione inviando lire duemila.



LA MOZAIKO DE "Nia Sinjorino de la Espero - Patronino de la Esperantistoj" estas jam realaĵo, eĉ ĝi brilas jam en la sanktejo de Nazareto, en la templo de la Anunciacio.

Estis revo de la katolikaj esperantistoj, ke apud la bildoj kiuj prezentas la saman Protektantinon de la malsamaj nacioj, bildoj freŝdataj aŭ jarcentaj, tiom amataj de la dankaj popoloj, troviĝu ankaŭ tiu, kiu per la internacia lingvo kunigas en la Patra hejmo ĉiujn homojn, kiel fratojn ĉirkaŭ sia Patrino.

En Nazareto leviĝas hodiaŭ impona la nova templo, kiun la sekvantoj de Kristo stariĝis en la humila loko, kiun la Filo de Dio elektis por disradii en la mondon kaj tra la jarcentoj la savan mesaĝon. Tiel delikate,

tiel modeste, ke neniu tiam en la vilaĝo suspektis la mirindan ricevitan privilegion, kie tamen la plej simplaj agoj de la Filo de Dio fariĝis samvaloraj por nia elaĉeto, kiel la plej grandaj de la Tabor aŭ de la Golgoto, kie en la ĉiutaga kuniĝo al li, Maria leviĝis al la plej alta sankteco, kaj ŝi, ripetante al ni la vortojn diritajn en Kana: "Faru tion, kion li diras al vi", montras al ni la saman dian vojon de la perfekteco.

La katolikaj esperantistoj nun atendas instrukciojn kaj akordiĝojn por plenumi, per sia vizito al Nazareto, sian dankesprimon pro la ricevita kredo kaj preĝi pli fervore por ĝia disvastiĝo al ĉiuj fratoj en la mondo.

LA PRETIGO DE LA MISALO en la Esperanta lingvo progresas. Dum julio ni transdonos al Mons. Pichler, episk. de Banja Lucka, la unuan duonon de la volumo, por la oficiala revizio. Antaŭ la fino de la kuranta jaro ni esperas sendi ankaŭ la alian parton. La tuto ampleksos verŝajne ĉirkaŭ mil paĝojn. Ni volas prezenti ĉi tie ĝian enkondukon, kiu taŭgis ankaŭ kiel raporto pri la liturgia sekcio en la sacerdota kunveno, priskribita supre en la itala lingvo.

"Tuj kiam la II Vatikana Koncilio, per la Konstitucio pri la Sankta Liturgio, dekretis, ke la Roma misalo, uzita ekde la Tridentina Koncilio (1570) estu renovigita, tiel ke la tekstoj kaj la ritoj "esprimu pli klare la sanktajn realaĵojn pri ili signifitajn" (n.21) kaj ke "estu faciligata la pia kaj aktiva partopreno de la fidelularo" (N.50), la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista decidis entrepreni la laborojn por la preparo de la Esperanta misalo, paralele al la eldonoj farotaj en ĉiuj naciaj lingvoj.

Fakte, la motivo postulanta tradukon de la liturgiaj tekstoj en la naciajn lingvojn, valida ankaŭ por la esperantistaj medioj, ŝajnis tre grava ĝuste pro ilia internacia konsisto.

Kiu nacia lingvo povus ja esti komune komprenata de tiuj medioj? Praktike neniue. Oni ne povas serĉi la solvon, revenante al la latina, kiu antaŭe estis la oficiala liturgia lingvo, ĉar la latina pli kaj pli malaperis post la enkonduko de naciaj lingvoj en la liturgion; kaj krome, ĝi estas entute fremda kaj absolute ne komprenebla por la pli granda parto de la mondo.

Restis do unika solvo, kaj plej logika, ke, samkiel la esperantistoj el ĉiu mondparto interkompreniĝas per la internacia lingvo, ankaŭ iliaj religiaj kunvenoj estu en Esperanto.

La fakto, ke la konstitucio, parolante pri naciaj lingvoj, ne menciis la internacian, ne montriĝis serioza obstaklo, ĉar la spirito de la leĝo solvis tuj la dubon.

Decidante do la pretigon de la liturgiaj tekstoj, grava demando estis la amplekso de la laboro. Nome, ĉu ĝi devos rilati ĉiujn liturgiajn tekstojn, pri breviero, pri sakramentaj ritoj, pri misalo, ktp.? Ekskludinte la brevieron, kiel ne urĝan aferon en la nuna esperantista medio, oni opiniis, ke ne estas apartaj malfacilaĵoj por la sakramentaj ritoj.

Sed restis la problemo de la misalo, aŭ pli bone de la meslibroj. Longe kaj intense allogis la idealo pretigi la kompletan liturgian riĉaĵon de la meso. Sed fine, oni decidis unue pretigi tion, kio estas plej urĝe necesa. Poste, laŭgrade oni komple-

tigos la aferon, kiu postulas ĉlmenaŭ sep dikajn volumojn.

Oni decidis prezenti per unika misaleta, taŭga samtempe por sacerdoto kaj fideluloj, la meson de la dimanĉaj aŭ solenaj tagoj, dum kiuj, meze de kunvenaj laboroj, oni plenumos la kristanan devon, nome, sanktigi la feston, laŭ la ordono de Dio kaj la eklezia preskribo. Temas do pri volumeto, kiu povos esti larĝe uzata de la esperantista medio: sacerdotoj kaj fidelularo. Kaj ĉion, kio, ankaŭ sub ĉi tiu limigo, ne ŝajnis urĝe necesa, oni prokrastos ĝis, espereble, ne malproksima estonteco.

Pli grava problemo montriĝis la efektivigo de la celo. Fakte, dum ne ekzistas specialaj malfacilaĵoj en la preparo de nacilingvaj liturgiaj tekstoj, ĉar ĉe ĉiu nacio estas bone organizitaj diocezoj kun ĉiuj necesaj oficejoj kaj komisionoj kunlaborantaj por la disvolvo de la religia vivo, ne ekzistis ankoraŭ, ĝuste pro ilia internacieco, tiaj esperantistaj organismoj, kiuj povu skrikte kunlabori en afero, kiel ĉi tiu, kiu postulus ne unu aŭ malmultajn personojn, sed ampleksan aron da specialistoj.

La grava malfacilaĵo estis venkita per la persista klopodo de la IKUE-a stabo, kvankam la laboro ne povis esti tiel rapida, kiel ĝi sukcesis pri kelkaj naciaj lingvoj.

Sin apogante fidele al la jam aprobitaj tekstoj latinaj aŭ de aliaj lingvoj, la esperantaj tradukistoj celis tamen kiel eble faciligi kaj klarigi la signifon de esprimoj, kiuj, devenante de tre antikvaj idiomoj, havis ofte vortigojn tro malproksimajn de nia esprimmaniero. Oni klopodis, por ke la profundaj signifoj de la religiaj tekstoj estu kompreneblaj eĉ al homoj

devenantaj de la plej diversaj kontinentoj, aŭ de ŝtatoj tiel junaj, ke ili ne havis ĝis nun literaturan tradicion.

La esperanta lingvo, per si mem simpla, donis eblecon, eĉ pli ol oni povis esperi, por klarigi konceptojn tre altajn, kiaj estas tiuj, kiuj rilatas kredajn misterojn, aŭ fremdajn al nia nuntempa pensmaniero, pro sia fora origino.

Sed la tekstoj de la Biblio, bazo de la tuta liturgia, laŭ la preskaŭ klasika traduko de la Brita Biblia Societo, ne ĉiam ŝajnis kontentigaj, kaj pro la novaj interpretadoj ebligataj per la progresintaj bibliaj studoj, kaj ankaŭ pro la iom malnova stilo de la verko, entenanta interalie multajn hebreismojn, ne necesajn kaj ne taŭgajn por internaciaj medioj. Pro tio oni preferis sekvi, en kazo de duboj, pli ol la laŭvortan fidelecon, la vojon de la klareco, laŭ la indikoj de la Liturgia Konstitucio, sekvataj cetere de ĉiuj naciaj liturgiaj komisionoj.

La apero de nia esperanta misalo ĝuis ankoraŭ oportunan eksperimentan tempon, ĉar, dum la fazoj de la liturgia renovigo kaj de preparo de la tekstoj, oni jam uzis ilin, vaste kaj daŭre aldonante ĉiam novajn korektojn kaj perfektigojn, laŭ la direktivoj de la porliturgia S. Kongregacio, kaj ankaŭ laŭ individuaj sugestoj ricevitaj. Kelkaj tekstoj estis renovigitaj eĉ multfoje.

Ĉiujn zorgojn ni havos por la alloga aspekto de la presado, per la distingo de diversaj tipografiaj literoj, kaj por plaĉa kaj harmonia aranĝo de la tekstoj.

Ni agnoskas, ke , kvankam ni nenion ŝparis por la atingo de nia alta idealo, doni al la katolika esperantista fidelularo indan meslibron laŭ la reformita liturgio, dekretita de la Eklezio, ni ne faris per fektan laboron.

Sed ni konscias, ke ni servis la religion kaj ni an esperantistan katolikan frataron, instigante aliajn fari ne nur la samon, sed multe pli ampleksan kaj perfektan laboron, laŭ la celo de la Liturgia Konstitucio, kiu (n.48) skribis: "La Eklezio tre intense zorgas, ke la piaj kredantoj ne ĉeestu kiel in diferentaj aŭ mutaj spektantoj antaŭ ĉi tiu mistero de la kredo, sed ke, per plena kompreno de la ritoj kaj de la preĝoj, ili partoprenu konscie, pie kaj aktive en la sankta celebros; kaj ili instruiĝu per la dia vorto, nutriĝu ĉe la tablo de la Krista Korpo; danku Dion; oferante la senmakulan hostion, ne nur per la manoj de la sacerdoto, sed kune kun li, ili lernu oferi sin mem, kaj de tago al tago, per Kristo nia Peranto, ili estu perfektigataj en la unueco kun Dio kaj inter si, tiel ke Dio estu, fine, ĉio en ĉiuj".

REDONIS SIAN BELAN ANIMON AL DIO s.ino Lucia Terrazzani, je la 17a de aprilo en Verono. Kiu ne memoras pri tiu verva figuro, kiu tiom laboris en nia katolika esperantista movado, precipe kiel sekretariino de nia 29a IKUE-Kongreso en Romo? Transdonante ĉi tiun malĝojan informon, ni petas preĝojn por ŝia animripozo.

Memore de ŝi ni reprenas de la 70a numero de K.S. la tradukon de ŝi faritan por nia bulteno de kortuŝaj pensoj pri la dolorplena vizaĝo de Jesuo, kun nia ilustraĵo porokaze skizita.



VIA VIZAĜO, HO SINJORO !

Mi vidis vian vizaĝon,
 ho Sinjoro!
 Vian vizaĝon humiligitan,
 deformitan per pugnoj
 kaj pro sango;
 kaj de kraĉoj malpurigitan.
 Vian dian vizaĝon,
 ho Sinjoro!

Tremetantan pro amo
 kaj vipatan de homa malamo,
 de ĉiu malpardono.

Mi ĝin rigardis...
 Ĝi estis vizaĝo de ĉiuj,
 estis vizaĝo de l' mondo.
 Vizaĝo de senkulpa infano
 perfidita en la amo.

Vizaĝo de senkonscia ateisto,
kiu serĉas la vivon.

Via vizaĝo, ho Sinjoro!
Estis vizaĝo de junulo
viv-avida.

Vizaĝo sulkita pro la tempo
de mortonta maljunulo.
Estis vizaĝo de ĉiu sufero,
estis vizaĝo de ploro.

De ĉiu ĝojo
estis krome, ho Sinjoro,
vizaĝo via sankta!

Mi apogis mian vizaĝon
sur la vian,
kaj ekkonis la amon.
Mi ekkonis, ke la vizaĝo
de ĉiu homo,
la vizaĝo de ĉiu frato
estas via vizaĝo,
ho Sinjoro!

EN LA 15a JARO POST LA MORTO de la IKUE-ano
patro Emanuelo, frato de la subskribinto, kelkaj el li
aj konintoj petis, ke mi menciu pri li en nia bulteno.
Bonvole mi tion faras, kvankam mi konis lin vere tro
malmulte, ĉar li pasigis preskaŭ sian tutan vivon mal
proksime de mi.

Animo larĝe malfermita al afabla bonkoreco, de sia in
fanaĝo li revis fariĝi misiisto; kaj enirinte en la kar-
melanan ordenon, li sukcesis kun granda ĝojo plenu
mi sian deziron, ĉar jam kiel studento li estis sendita
al Sirio por lerni la araban lingvon kaj tiel pretigi sin
por la misia vivo. Lerni tiun malfacilan lingvon estis
por li vera ĝuo, ĉar pri lingvo-lernado li ŝajnis havi

preskaŭ naturan inklinon. Dum multaj jaroj, fakte, li povis servi en sia misiista laboro al la ĉiulandaj katolikoj, kiuj venis de Eŭropo, Azio kaj Afriko. Per almenaŭ deko da lingvoj li povis interrilati kun ili en sia misia tasko: skribi, prediki, konfespreni.

Sed post la gepatra lingvo, li unue konatiĝis kun la esperanta, kiam li estis nur dek du-, dek tri-jara. De tiam li ne plu neglektis la internacian lingvon; eĉ li sukcesis esperantigi multajn aliajn kaj fari kursojn, profitante la oportunecon, kiun li havis kiel instruisto, ankaŭ post la turka okupacio, kiam la siria Aleksandreto - la kampo de lia laboro - aliĝis al Iŝkenderun. Multajn tre karajn amikojn li akiris pere de Esperanto, el ĉiuj kontinentoj. Unu el liaj lastaj disĉiploj estis ĝuste mi, kiu ricevis de li perletere lecionojn pri Esperanto, de li mem diligente verkitajn.

Ne facile estis por li partopreni en Esperanto-Kongresoj; sed kiam li sukcesis tion fari, kiel okaze de la 29a Itala Esperanto-Kongreso en Palermo, li dum la meso komentis la evangelion esperantlingve.

Je la dekkvina de decembro 1959, 69jara, morte trafita de subita koratako (pro supermezura laboro, ĉar, krom siaj instruhoroj li estis alpreninta tiujn de alia malsan*ig*inta instruista kunfrato), li estis sepultita en la sama karmelana preĝejo, ĉe kiu li loĝadis. Post sep jaroj, mi kun esperantista grupo, survoje al Jerusalemo, povis viziti lian tombon kaj celebri funebran meson, okaze de kiu, patro Rinaldo, li ankaŭ misiisto en la sama loko, memorigis en la esperanta lingvo la neforgeseblan kunfraton, admonante la ĉeestantojn gardi kaj vigligi tiun internacian, pli bone, katolikan senton, kiu karakterizis la tutan vivon de patro Emanuelo.

 El la katolika Eklezio

 n° 129.

ROMO = KOMUNIKAĴO DISDONITA de la prezidanteco de C.E.I. (Itala Episkopa Konferenco) post la referendumo pri divorco.

"Ricevinte la rezultojn larĝparte malfavorajn pri nuligo de la pordivorca leĝo, la prezidanteco de la Itala Episkopa Konferenco, dunĝi rigardas kun la necesa respekto la decidon esprimitan de la plejparto de la voĉdonintoj, ne povas ne esprimi sian profundan malĝojon pro la definitiva forlaso en la civila leĝaro, de la laŭnatura kaj kristana modelo, kaj laŭ home plene konvena, leĝo pri nerompebla geedziĝo kaj pri familio stabile kunligita.

Neniu alia intenco, krom la paŝtista, kunligita al la episkopa ofico, instigis la italajn episkopojn adresi ĝis nun lojalan alvokon al la konscienco de la fidelularo kaj de la bonvolaj homoj, por ke ili ebligu gardadon, eĉ per juraj institucioj, kiel ĝis 1970 okazis en la sendependa kaj konstanta itala tradicio, de ne rifuzebla valoraĵo por la familio kaj la socio.

Tio produktus validan instruan rimedon por la novaj generacioj kaj subtenon ne malgravan por la familia stabileco kaj por la moraleco de la nacio.

La italaj episkopoj pro tio plenumis antaŭ Dio kaj la homaro sian ne preterlaseblan devon, konforme al la eklezia instrurajto, kiu estis komisiita al ili, por prilumi kaj helpi ĉiujn, kiuj serĉas la veran progreson de la homoj kaj de iliaj institucioj.

Sin apogante al tiu konscio kaj al la kunsento de la mul
taj, kiuj sekvis ilian alvokon, la italaj episkopoj des
 pli firme nun fidas en la dia helpo kaj rigardas kun se-
 rena espero al la estonteco de la itala familio kaj de la
 Eklezio.

La zorgo por prifamilia paŝisteco, kiun la Koncilio ĉi
 am indikis unuaranga kaj urĝa, ne finiĝas por la katoli
 koj kun la referenduma konsultado; sed el ĝiaj rezultoj
 mem ĝi eltiras motivon por vastiĝi kaj intensiĝi laŭ ĉiu
 nivelo kaj cirkonstanco.

Pro tio la italaj episkopoj, dumili ree proklamas, ke
 ili ĉiam konkrete zorgos por la problemoj de la familia
 vivo kaj por trejnado al sana kaj modela geedziĝo, sin
 adresas al ĉiuj kredantoj, al ĉiuj komunumoj kaj ĉefe
 al ĉiuj kristanaj familioj, por ke per eduka formado kaj
 per la ekzemplo de sia vivo, ili fortigu de interne la
 geedzan kaj familian instituton, kiu vere estas funda-
 mento de la socio.

Kaj de ĉiuj, kiuj havas publikan respondecon, la italaj
 episkopoj petas kunan agadon por solvi la pezajn soci-
 ajn problemojn, kiuj de ekstere premas kontraŭ la for-
 teco kaj unueco de la familia konsisto.

Estas do dezirinde, ke la referenduma okazintaĵo reve-
 ku en ĉiuj la senton de pli grava respondeco kaj stimu-
 lu la kredantojn klare realigi la koncilian admonon: "La
 kristana familio, ĉar ĝi naskiĝas de geedziĝo, kiu es-
 tas bildo kaj partopreno de la ama pakto inter Kristo
 kaj la Eklezio, manifestos al ĉiuj la vivan ĉeeston de
 la Savanto en la mondo kaj la aŭtentikan naturon de la
 Eklezio per la amo, per la malavara fekundeco, per la
 unueco kaj fideleco de la geedzoj, per la ama kunlabo-
 ro de ĉiuj ĝiaj membroj".

"JUBILATE DEO" estas la titolo de malgranda volumo pri gregoriaj kantoj, eldonita la 14an de aprilo, je Pasko, per la Vatikana Poliglota Presejo. La Papo sendis donace ekzempleron pri tio al ĉiuj episkopoj kaj al la Generalaj superuloj de la tuta mondo.

Temas pri antologio de liturgiaj kantoj, kiuj post kelka tempo de necerteco, hodiaŭ iom post iom retrovas sian ĝustan pozicion en la disvolvo de la liturgio, laŭ la normoj de la liturgia Konstitucio de la dua Vatikana koncilio, kiu konfirmis: "La Eklezio agnoskas la gregorian kanton kiel ĉanton de la roma liturgio; pro tio en la liturgiaj celebroj, je samaj kondiĉoj al ĝi estu donita la ĉefa loko" (n. 116). Fakte, malbone interpretante la koncilian normon pri la uzo de la naciaj lingvoj, kelkaj opiniis, ke ĉio, kio estis antikva, estu rifuzinda, ne kalkulante la grandajn riĉecojn, kiuj estas kaŝitaj en la trezorejo de la eklezia liturgio.

La volumeto entenas 24 ĉantojn: la Ordinara parto de la meso ("Kyrie", Gloria", "Credo", "Sanctus", "Agnus Dei" - krom "Haleluja", Prefacoj, "Pater noster" kaj Aklamoj); kelkajn eŭkaristiajn gregoriajn ĉantojn (himnoj "Adoro te devote", "O salutaris hostia", "Tantum ergo"; antifono "Ubi charitas est vera"; psalmo "Laudate Dominum"); primariajn kantojn ("Ave maris stella", "Magnificat", "Regina coeli", "Salve regina"); kantojn por apartaj cirkonstancoj ("Da pacem", "Parce Domine", "Te Deum", "Tu es Petrus", "Veni Creator"). Laŭ la sugesto de la Papo plurfoje ripetita, estas konvene, ke tiuj ĉantoj estu lernataj kaj praktikataj de la fidelularo. Kompreneble, oni povas uzi ĉiujn aliajn, jam apartenantajn al la liturgio, kiel same oni povas uzi aliajn harmoniojn, ol tiujn proponitajn en la libreto.

EN BELGUJO TROVIĜAS 10.185 religiuloj: 1475 vivas en abatejoj; preskaŭ la sama kvanto apartenas al misiaj kongregacioj; ĉirkaŭ kvin mil estas membroj de apostolaj kongregacioj kaj 2.339 kunlaborantaj fratoj. Pri religiulinoj oni ne havas precizajn indikojn, sed oni kalkulas, ke en la tuta Belgujo ili estas ĉirkaŭ tri-dek mil. Rimarkinda, sed ne sufiĉa kvanto.

La belga Eklezio estas zorgoplena pro la krizo de la vokiĝoj. En ĝiaj seminarioj enlistiĝis, dum 1973, 601 lernantoj, anstataŭ 203 de 1963. Kaj dum la ĵus pasinta jaro oni havis en la tuta Belgujo nur 51 ordiniĝoj, anstataŭ 165 de 1963. Alia dolora ĉapitro estas tiu de la forlasoj, kiuj estis pasintjare 40 el 9.384 diocezaĵaj pastroj.

FRANCUJO. = Kard. JEAN DANIELOU, fama teologo kaj verkisto, mortis subite en Parizo la 20an de majo, 69jara. Li estis unu el la plej elstaraj teologoj de nia tempo.

Li naskiĝis la 14an de majo 1905 en Neuilly, ĉe Parizo; eniris en la ordenon de la Jezuitoj fine de 1929 kaj estis ordinita sacerdoto la 20an de aŭgusto 1938. Lia tezo por doktoriĝo en teologio, pri la mistiko de sankta Gregoro de Nissa, gajnis plenecon de voĉdonoj kaj laŭdon. Ĝi estas fundamenta studo pri platonismo de la antikvaj patroj de l' Eklezio. En 1943 li doktoriĝis ankaŭ pri beletristiko en la "Sorbona" universitato, kaj tuj poste li sin dediĉis al instruado kaj verkado de multaj libroj pri patristiko. La malkovro de la bibliaj papirusoj de Qumram altiris lin al enprofundigo de judeo-kristanismo.

Dum la Koncilio Jean Danielou estis elektita de Johano 23a teologia spertulo. Kiel pioniro de la nuntempigo de la Eklezio, li celis renovigi la dialogon inter la Eklezio kaj la mondo, kaj li ne malmulte inspiris la konci-

lian konstitucion "Gaudium et spes". Post la koncilio li metis sian vastegan kulturon je la servo de la vero, intervenante kun decido kaj forto en ĉiujn problemojn kreitajn de la modernistaj teorioj.

Lia konstanta celo estis subteni la katolikan veron kun intelekto kaj amo. Paŭlo 6a elektis lin kardinalo enkonistorio de 1969, kun la tasko partopreni en la kongregacioj por la katolika instruado kaj por religiuloj kaj laikaj institutoj. Li estis ankaŭ membro de la Sekretariato por ne-kristanoj, kaj partoprenis en la eksterordinara Sinodo de oktobro 1969.

En Francujo li estis taksita kiel unu el la plej elstaraj homoj pro lia vasta kulturo, kaj je la 9a de decembro 1972 li meritis esti elektita membro de la Franca Akademio. Per lia morto la nombro de la kardinaloj falis al 131.

EN LURDO KUNVENIS dum la ĵus pasintaj tagoj preskaŭ dek kvin mil soldatoj apartenantaj al dek du ŝtatoj por la 16a internacia soldata pilgrimado.

Ĉi tiuj junuloj en siaj malsamaj uniformoj, sur kiuj brilis, inter la signoj de la respektivaj soldataj fakoj, ankaŭ tiuj de la pilgrimado, svarmis tra la maria urbo gajaj, viglaj, plenaj de kristana fervoro en ne imagebla harmonio de kredo kaj vivo. Ili renkontiĝadis, estiĝante gajajn grupojn, interfratiĝante kaj interŝanĝante insignojn, emblemojn, ĉapojn. Kaj sin reciproke fotinte, brakenbrake kantadis, ĉiu en sia lingvo, sialandajn kanzonojn. Spite de la diverseco de la lingvoj, ili tre bone interkompreniĝis. Bela spektaklo de preĝado, pri penso kaj karitato, ĉefe dum la celebradoj en la nova preĝejo de sankta Pio 10a, kun havebleco de dudek mil personoj, kaj dum la procesio kaj malsanulbenado en la esplanado antaŭ la baziliko de la Rozario. Ne mankis malsanaj soldatoj kuŝantaj en brankardoj, kaj ankaŭ aliaj kun familianoj.

NOVA CENTRO POR MALSANAJ PILGRIMANTOJ estis programita en Lurdo. Fakte, de la malmultaj centoj da malriĉaj malsanuloj en 1874, oni alvenis al miliono dum la lastaj dudek jaroj. La du aktivaj nunaj centroj: "Accueil Notre-Dame" kaj "Hôpital N.D. des douleurs" ne plu sufiĉas por ĉiuj petoj.

La nova centro, kiu povos gastigi preskaŭ kvar cent pilgrimantojn, antaŭvidas kvaretagan konstruaĵon, kiu ne estos permanenta hospitalo, sed komforta portempa malsanulejo, ekipita pri ĉio, kion la moderna asista komplekso postulas: higieno, flegado, kunvenejo, kuracista asisto.

Sed la malsanuloj en Lurdo, pli ol miraklan resaniĝon, serĉas plifortigon de espero kaj iom da komprene mo, kiun nia nuntempa socio, elprenita de tiu konsumisma konvulsio, kiu trenas la homojn de nia teknologia erao, ĉiam malpli kapablas doni. Male, neniu pli taŭga kuracilo estas ol tiu konsolvorto, kiu povas reveki esperon. La vera miraklo, kiu ĉiutage renoviĝas en Lurdo, estas ĝuste tiu mesaĝo pri amo kaj paco, kiu de la suferantaj vizaĝoj leviĝas kiel esperlumo sur la tutan homaron.

LA HOMAJ KAJ SOCIAJ PROBLEMOJ de la 3.700.000 migrintoj al Francujo konsistigas la temon de insista alvoko, flanke de la franca komisiono por emigrintoj. La episkopoj invitas la kristanojn pripensi dum la Sankta Jaro de la repacigo, la gravan situacion de la fremdaj laboristoj en Francujo.

La dokumento celas altiri la atenton sur la kaŭzojn de la migradoj kaj sur la tipon de akcepto, kiun la emigrintoj trovas en Francujo koncerne laboron, loĝadon, instruadon de la filoj kaj protekton de siaj rajtoj ankaŭ politikaj kaj de sia kulturo.

La episkopa komisiono, fine, memorigas, ke la ĉeesto

de la multaj alilandaj laboristoj devas doni al la francoj stimulado por konkreta atesto de sia religiakredo.

ITALUJO : EN TEATRO "SAN CARLO" de Milano je la 19a de majo estis asignita al Patrino Tereza de Kalkuto la premio "Patrino Universala 1974", iniciate de la Centro por asisto de Elmigrintoj.

Kune kun Patrino Tereza, kiu ricevis la premion por la Azia kontinento, troviĝis kvar aliaj virinoj, kiuj oferis sian vivon por siaj filoj kaj por tiuj de la aliaj: Asunta Roncalli, fratino de Papo Johano, por Eŭropo; Ethel Kennedy, edzino de Robert Kennedy, por Ameriko; Josefa Baker, la konata negra kantistino, rezidanta en Parizo, kiu adoptis multajn infanojn, por Afriko; Monticelli Maria, patrino de elmigrinto en Aŭstralio, por ĉi tiu kontinento.

Estas nepre novaĵo, ke kiel "Universala Patrino" estas elektita religiulino, nome, en ĉi tiu kazo, Tereza de Kalkuto, kiu dediĉas sian vivon al la plejmalriĉuloj inter ĉiuj; al tiuj, kiujn neniu amas kaj pri kiuj neniu zorgas. Pri tiu virino, kiun ni jam menciis kelkfoje en nia bulteno (KS.1971, n.2; 1973, n.5; ktp.) estas bele ankoraŭ paroli, por reliefigi, ke en nia tempo ne estas nur abomenindaĵoj, frandaĵo de granda parto de la ĵurnalaj kronikoj, sed ankaŭ tiom da mirinda boneco, kiu preferas agadi senbrue kaj en la silento.

Patrino Tereza forlasis sian instruistan taskon, por plenumi la karitaton de la bona samariano, por vivi meze de la enbarakiĝintoj de Kalkuto, por servi la plej malriĉajn inter la malriĉuloj, por forpreni ekmortantojn sur la stratoj kaj helpi ilin por bona morto.

Al tiu, kiu petas de ŝi: "Kial ŝi elektis la plej forlasitajn malriĉulojn, nome tiujn, kiuj de la progresteknikistoj estas taksataj nura pezo por la socio", ŝi respondas ridetante, kiel pro stranga demando: "Mi ne scias; verŝajne tio estas vokiĝo". Ŝia aspiro kaj unika celo e



stas "plenumi ion belan por Dio". "Multaj faras ion por io; ni faras ion por iu". "Mi havas konvinkon, ke la malriĉuloj servas al ni, ne malpli ol ni al ili. Apud ili, ni mem fariĝas pli bonaj". Ĉi tiuj frazoj estas preskaŭ insigno, devizo, simbolo de Patrino Tereza.

Ŝia prijuĝo de malriĉulo kaj malriĉeco estas profunde malsama de la nia. Laŭ ŝi malriĉulo estas mirinda estaĵo, kapabla ĝojigi: "Se vi konus malriĉulojn, vikonus ankaŭ la ĝojon, kiun donas la malriĉuloj". Ĉia patronismo kaj ĉiaspeca koloniismo estas tute for de ŝia akceptmaniero al malriĉuloj: oni dirus, ke por ŝi la solvo de la mondproblemoj ne kuŝas en la riĉeco, sed en malriĉeco, de ĉiuj agnoskata kaj akceptata.

Se vi provas kaŝpreni de ŝi polemikan sentencon kontraŭ riĉuloj, ŝi respondas: "Kiuj ni estas, por prijuĝi riĉulojn? Ni nur povas klopodi, ke riĉuloj kaj malriĉuloj renkontiĝu. Miaj fratinoj fariĝis renkontiĝa ponto". Al iu, kiu rimarkis, ke ŝia agado estas nur asista, ke ĝi solvas neniun problemon, kaj ke ĝi allasas ĉiujn

maljusta ĵojn, ŝi firme respondis: "Ni devas doni ĝis o fero, ĝis ni spertu, kion signifas esti senhavulo. Por helpi malriĉulon, oni devas havi sperton pri malriĉeco".

Ŝia vivo estas simpla. Ĝi nenion eksterordinaran havas. Naskiĝinte en Jugoslavio en 1910 de albanaj gepatroj, ŝi en 1928 estas novicino de la Laŭretanaj fratinoj; je la 10a de aŭgusto 1948 ŝi forlasas la robon de sia kongregacio kaj surmetas la blankan hindan sarion kun bluaj strioj kaj kruco surŝultre. Dum tri monatoj ŝi frekventas flegistan kurson en Patna.

En 1949 ŝi akceptas por kunlaboro la unuan bengalan knabinon (hodiaŭ la misiistaj fratinoj de la Karitato estas pli ol 870 kaj pli kaj pli ili kreskas: ŝia kongregacio ne suferas pro manko de vokiĝoj). Ŝiaj fratinoj en 1965 iras al Karakaso (Venezuelo), en 1967 al Kolombo (Ŝri-Lankao), en 1968 al Romo inter la enbarakiĝintoj kaj al Tabora (Tanzanio), en 1969 al Bourké, inter la aborigenoj de Aŭstralio.

Ŝi ricevis en 1971 la premion Johano 23a pro la paco (v. la foton); en 1972 la premion "Pandit Nehru" pro la internacia komprenemo, kaj multajn aliajn premiojn kaj altajn aprobojn de tiom da personoj apartenantaj al tiom da kredoj, ke estus neeble kalkuli. La ĉijara premio estas la dua, kiun ŝi ricevis en Milano, ĉar oktobre de la ĵuspasinta jaro ŝi ricevis de la urbestro la "oran Ambrosion".

RUMANIO = EKUMENA SIMPOZIO pri: "Scienco kaj teknologio por la homa progreso" okazos en Bukareŝto de la 24a de junio ĝis la 2a de julio, iniciate de la Tutmonda Konsilio de la Eklezioj. Ĝi konsistigos konkludon de kvinjara pristudado de la problemo: "Estonteco de la homo kaj de la socio en mondo regata per teknologio".

La diskutoj temas pri la moralaj kaj spiritaj dimensioj rilatantaj demografian kreskon, pri uzado de la naturaj riĉaĵoj kaj gardo de la vivmedio. La rezultoj de la simpozio estos ekzamenataj en la 5a asembleo de la e-kumena konsilio de la Eklezioj, kio okazos venontjare. Por la preparo de tiu konferenco jam laboras du sekcioj de la Konsilio, la departemento "Eklezio kaj socio" kaj la komisiono por partopreno de la Eklezioj en la progreso.

AFRIKO: EBURIO = LA MISIO SANKTA ANNA de la diocezo de Gagnoa celebris la kvindekan datrevenon de sia fondiĝo.

Fakte, en 1924 du misiistoj de la Asocio por la Afrikaj Misioj malfermis al la evangelizado la regionon de Betté, en la okcidenta parto de Eburio. En la celebrado ĉeestis unu el la du fondintoj, patro Gandon, kiu lasis Bretonujon, sian naskiĝlandon, por reiri al Gagnoa dum kelkaj semajnoj.

Partoprenis en la solenoj ankaŭ la ŝtatestro, Ouphouet Boigny; mons. Yago, ĉefepiskopo de Abdjan, mons. Tekri, episk. de Gagnoa kaj la Apostola Nuncio de Eburio, mons. Würstenberg.

La misio de Gagnoa, fariĝinta diocezo en 1956, estas unu el la plej florantaj en Eburio. Ĝi havas ĉirkaŭ dudek mil katolikojn, helpatajn de dekkvino da diocezaĵaj pastroj kaj de 33 misiistoj.

AZIO: FILIPINOJ = Por doni azian kontribuaĵon al la proksima episkopa Sinodo, kiu alvokos al Romo en oktobro episkopajn delegitojn el la tuta mondo, estis antaŭ nelonge organizita apud Manilo kunveno de episkopoj pri socia agado.

Partoprenis episkopoj, sacerdotoj, sociologoj, kuraĉistoj kaj edukistoj el 9 landoj de la sudorienta Azio, nome: Malajzio, Kamboĝo, Laoso, Tajlando, Indone-

zio, Ŝri-Lankao, Filipinoj, Hindujo kaj Japanujo. La kompleksa religia realo de Azio estis ekzamenita laŭ ĉiuj aspektoj kaj laŭ la problemoj, kiuj postulas solvon.

HONGKONGO = REPRESENTANTOJ de la katolika kaj anglikana Eklezioj subskribis komunan dokumenton, en kiu estas reciproke agnoskita la valideco de la baptodona al siaj fideluloj, kaj okaze de transpaso de unu al la alia Eklezio, oni ekskluzivas neceson ripeti la riton. La dokumento estis subskribita de la katolika episkopo, mons. Lei, de la anglikana episk. Gilbert Baker kaj de pluraj iliaj kunlaborantoj. En ĝi interalie oni deklaras: "Ni ĝojas pro ĉi tiu esprimo de kristana unueco; ni promesas pritaksi la bapton donitan en la alia konfeso kiel dian agadon, kaj sekve ne ripeti ĝin eĉ kun kondiĉo; ni promesas fidelan observadon de la baptaj ritoj, postulitaj de la respektivaj eklezioj; ni devigas nin al plia porunuiga laboro en ĉiuj kampoj de la vivo kaj doktrino de la Eklezio, inkluzive tiujn, en kiuj ĝis nun ekzistas ankoraŭ realaj kaj seriozaj malfacilaĵoj".

JAPANUJO = SERIO DA RENKONTIĜOJ dediĉotaj al renovigo de la Eklezio okazos iniciate de la Ekumena Instituto de Ĉikago. La seminarioj artikiĝos laŭ du kursoj: la unua en Tokio, koncernos la parokon; la dua en Kioto estos dediĉata al la kontribuaĵo de la kristanoj por la konstruo de nova socio. La Ekumena Instituto naskiĝis je 1954 en la Nordamerika ŝtato de Ilinojso, zorge de la Tutmonda Konsilio de la Eklezioj. Hodiaŭ partoprenas en ĝi 1.600 membroj, kiuj agadas en 84 internaciaj centroj. Aliĝas al ĝi multaj protestantaj konfesioj, krom larĝa reprezentado de katolikoj kaj anglikanoj. Aparte grava estas ĝia celo pri renovigo kaj kunlaboro inter la Eklezioj.

ABONKOTIZON
AL KATOLIKA SENTO
SACERDOTOJ POVAS PAGI
ANKAŬ PER CELEBRO
DE DU S. MESOJ,
PRI KIUJ ILI BV. INFORMI
P. JACOBITTI

Quota di abbonamento L. 1500

Abonkotizo italliroj 1500

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV/70
BOLLETTINO MENSILE